1428/2

JANUARO—MARTO 1915

# HARMONIO

## BULTENO

de la

## Tutmonda Interkoresponda Klubo




NOV JORKO, USONAJ

**Prezo: Unu spesmilo pojare**

HARMONIO
1 OKCIDENTA 34a STRATO
NOV JORKO, USONAJ

# ALVOKO

Estimataj gesamideanoj :—

Pro la eŭropa militado Esperanto, nia kara lingvo senteble suferas multe kaj tuta nia korespondado renkontas neatenditajn barilojn. Ni scias ke nuntempe nia urbo Nov Jorko estas la plej internacia urbego en la mondo en kiu loĝas ĉiuj kvin homaj rasoj kaj la loĝantoj estas reprezentantoj de ĉiuj blankrasaj kaj kelkaj flavrasaj lingvoj. Ni ankaŭ scias ke nia urbo estas de komenco de la milito la komerca centrejo en la tuta mondo kaj la tuta Usono estas neŭtrala; plue ĝi dissendis donace bezonaĵojn ĉien, kie militado okazas. Vi devas scii ke en ĉi tiu urbo krom komerco ankaŭ la industrio, la studado, la arto, la muziko kaj aliaj altaj homaj okupoj havas aregon da reprezentantoj kaj samtempe ne forgesu ke ĉiuj skoloj kaj politikaj problemoj havas ĉi tie siajn sekvantojn. Estas nia tasko montri al ĉiuj la praktikan parton de nia kara lingvo kaj tial ni fondas la tutmondan interkorespondan klubon HARMONIO por ke ĉiu Esperantisto aniĝu kaj interkorespondadu kun la anoj nur en tiun direkton, en kiu li estas interesata. Se nia klubo pligrandiĝos ni ŝanĝus nian bultenon en regu-

lan monatan revuon kaj tiamaniere starigos Esperanton sur pli alta videblejo ĉi tie ol ĝi estas nuntempe.

Nur UNU SPESMILO aŭ 50 amerikaj cendoj estas la jara kotizaĵo kaj tion vi povas sendi en vialandaj poŝtrespondkuponoj aŭ krediti sur la konton de nia Financa Sekretario ĉe la Ĉekbanko Esperantista en Londono, Anglujo.

Atendante vian tujan alligon, ni salutas vin samideane

**Tutmonda Interkoresponda Klubo**

**HARMONIO.**

# REGULARO

de la

**TUTMONDA INTERKORESPONDA KLUBO**

## "HARMONIO"

NOMO, SIDEJO kaj CELO:

1. La nomo de la klubo estas: **Tutmonda Interkoresponda Klubo "HARMONIO."** (plimallongigo: T. I. K. HARMONIO.)

2. Ĝia centra sidejo estas en la urbo: NOV JORKO (ŝtato de Nov Jorko) Usono.

3. Ĝia celo estas anigi geesperantistojn senrigarde al ilia pensmaniero, aĝo aŭ raso por plifaciligi al ili korespondadon kaj interŝanĝon aŭ kolektadon, en la Esperanta lingvo kun geanoj, kiuj estas interesataj en la sama ideo aŭ fako kaj tiamaniere kunigi verajn geamikojn.

4. Ĝia cetera celo estas disvastigi Esperanton per fondado de propra gazeto "HARMONIO," kaj se eble per eldonado de kantaĵoj, libroj, k. t. p.

5. Ĝi ankaŭ celadas plifaciligi vojaĝadon al ĝiaj anoj donante al ili la helpon de ĉiulokaj konsuloj aŭ konsulinoj.

## ANIĜO.

6. Ĉiu persono, kiu povas skribi Esperante, senrigarde al sia okupo povas iĝi membro, se kontenta kun ĉi tiu regularo kaj pagas la jaran kotizaĵon.

## KOTIZAĴO.

7. Jara kotizaĵo estas UNU SPESMILO por la sama kalendara jaro, kaj nedividebla pagable en poŝtrespondkuponojn, mononon aŭ poŝtmandatojn aŭ transskribon per la Ĉekbanko Esperantista aŭ iu ajn banko en la urbo de Nov Jorko.

## RAJTOJ.

8. Ĉiu membro rajtas
   a) laŭplaĉe elekti korespondfakon;
   b) laŭplaĉe korespondadi kun iu ajn membro sed nur pri la fako lin aŭ ŝin interesanta;
   c) ricevi la oficialan gazeton;
   d) plendi se ne ricevis respondon de sia elektita korespondanto dum ses semajnoj.

## DEVOJ.

9. Ĉiu membro
   a) devas respondi al sia korespondanto antaŭ ses semajnoj se la korespondaĵo koncernas la elektitan fakon;
   b) estas petata varbi pluajn anojn kaj informi la sekretarion de sia kontinento pri siaj ideoj kiel plibonigi la "HARMONIO"-n;
   c) devas atenti la cifrojn kaj ŝlosilon de la membroj kaj fakoj, kaj;
   d) skribi ĉiam la adresojn korekte laŭliste kaj legeble.



## ORGANIZO.

10. HARMONIO konsistas el DIREKTORARO kaj KONSULARO.

11. La DIREKTORARO konsistas el la FINANCA SEKRETARIO, kiu ricevas la monon de la klubo kaj administras la monaferojn, plue el tri SEKRETARIOJ, kiuj respondas la plendojn kaj helpas administri la aferojn de la klubo, ili reprezentas po unu aŭ pluajn kontinentojn kaj zorgados pri disvastigo de nia ideo en sia kontinento kaj starigo de konsularo.

12. HARMONIO starigos en ĉiu ebla loko po unu aŭ se necese pluajn konsulojn por plimultigi la anaron kaj montri al la samlokanoj la praktikan uzon de Esperanto je KORESPONDADO, KOLEKTADO, INTERŜANĜO kaj VOJAĜADO.

## DIVERSAĴOJ.

13. HARMONIO deziras ke ĉiu ano portu la Esperantan verdsteleton por almenaŭ parole helpi ĉiun renkontontan Esperantiston. HARMONIO celas eldoni propran steleton por ĉiu ano kun enskribo "HARMONIO" tiamaniere ĉiu Harmoniano aŭ Harmonianino estus facile konebla.

14. Ĉiu membro ricevos varbilojn por varbi pluajn membrojn.

15. Neniu forgesu ke kolektado postulas ŝanĝadon kaj ke membro kiu ne respondos senpardone povas perdi la rajtojn de l'aneco por ĉiam.

16. Se kunvene HARMONIO kunvenigos ĝiajn anojn por amuzado, parolado, ekspozicio, festenoj, koncertoj, teatraĵoj, ekskurzoj, k. t. p.

## ŜLOSILO.

### I. KLASO.

A Metu la poŝtmarkon bildflanke.
B Sendu vidaĵojn de via loko.
C Sendu vidaĵojn de iu ajn loko.
D Sendu nur bildojn de arto.
E Sendu bildojn de geaktoroj.
F Sendu bildojn de famaj homoj.
G Sendu bildojn de historiaĵoj.
H Sendu bildojn de naciaj vestaĵoj.

### II. KLASO.

**Mi kolektas:**

I. Poŝtmarkojn.
II. Gazetojn esperantajn.
III. Fotografaĵojn.
V. Mineralojn.
IV. Monerojn.
VI. Plantojn.
VII. Papiliojn.
VIII. Antikvajn librojn.
IX. Insektojn.

### III. KLASO.

**Mi deziras korespondadi nur pri:**

1. Aferoj lingvaj:
 a) Esperanto;
 b) nacia lingvo;



 c) antikva lingvo.
2. Aferoj politikaj.
3. Aferoj religiaj:
 a) Teozofio;
 b) Bahaismo;
 c) Katolikismo;
 d) Protestantismo;
 e) Hebreismo;
 f) Mohamedismo;
 g) Politeismo;
 h) Mormonismo;
 i) aliaj religiaj skoloj.
4. Aferoj kontraŭreligiaj.
5. Aferoj laboristaj.
6. Aferoj komercaj.
7. Aferoj teĥnikaj.
8. Aferoj militismaj.
9. Aferoj kontraŭmilitismaj.
10. Arto.
11. Arĥiteturo.
12. Animaloj.
13. Astronomio.
14. Anarĥiismo.
15. Demokratismo.
16. Dancoj.
17. Filozofio.
18. Fiziko.
19. Historio kaj Arĥeologio.
20. Homaranismo.
21. Ĥemio.
22. Individuismo.
23. Juro.
24. Kantoj.
25. Kutimoj kaj moroj.

26. Literaturo.
27. Ludoj.
28. Muziko.
29. Matematiko.
30. Medicino.
31. Modo.
32. Mineralogio.
33. Poŝtmarkoj.
34. Pedagogio.
35. Plejmultismo.
36. Socialismo.
37. Solimpostismo.
38. Ŝakludoj.
39. Teatraĵoj.
40. Turismo.
41. Vegetaĵoj.
42. Amikema korespondaĵo.
43. Vegetarismo.
44. Gimnastiko.
45. Kontraŭalkoholismo.
46. Virina egaliga movado.
47. Kontraŭnikotenismo.
48. Aŭtomobilismo.
49. Aeronaŭtiko.
50. Agrikulturo.
51. Aferoj maraj.
52. Aferoj sociaj.
53. Stenografio.
54. Teologio.
55. Vedantismo.



## ANARO.

1. D. A. Klajin, 1 W. 34, Nov Jorko.
A B F—VIII. 6, 9, 16, 17, 20, 22, 24, 26, 35, 39, 43, 45, 47, 48.
2. F-ino Amanda Peterson, 442 Manhattan Ave. Nov Jorko.
A B—4, 14, 17, 22, 26, 36, 39, 40.
3. F-ino Ludmila Reticky, 209 E. 71, Nov Jorko
A BE—I. IV. 4, 28, 33, 39, 40.
4. Benj. M. Crawford, 300 W. 111, Nov Jorko.
A B—4, 9, 20, 36, 21, 40, 42, 44, 46.
5. J. Ondraĉek, 422 E. 70, Nov Jorko.
A D—4, 5, 9, 42, 53.
6. F-ino Manjo Ondraĉek, 422 E. 70, Nov Yorko
A B—40.
7. Alexander Goldhirsch, 422 E. 70, Nov Jorko.
A B—I. IV.—33, 40, 44.
8. F-ino Carmen Planas, 124 E. 84, Nov Jorko.
A B—4, 9, 14, 31, 39, 40, 44.
9. Jack Wilt, 422 E. 70, Nov Jorko.
A B—I.—33, 40, 44.
10. Karolo Ŝipula, 436 E. 67, Nov Jorko.
A B—5, 42.
11. Joseph Zarwanitzer, 426 E. 70, Nov Jorko.
A B—4, 5, 9, 26, 36, 39, 40, 42.
12. F-ino Sarah Gelbtuch, 332 E. 91, Nov Jorko.
A B—III.—10, 20, 16, 24, 28.
13. Jacob Nussbaum, 335 Crimmins Ave., Bronx, N. Y.
B D E—1a, 2, 4, 5, 14, 20, 22, 26, 36, 39.
14. F-ino Manjo Kiraly, 1520 First Avenuo, Nov Jorko.
A B—III.—28, 40.

15. F-ino Lilio Kiraly, 1520 First Avenuo, Nov Jorko.
A B D—III.—10, 25, 31, 40.
16. Isidor Gingold, c. o. Tannenbaŭm, 50 E. 118, Nov Jorko.
E—II.—1a, 26.
17. Samuelo Jaffe, c. o. Spanglet, 293 Second strato, Nov Jorko.
A B—II. III.—4, 9, 20, 45.
18. F-ino Cora L. Buttler, 2074 Richmond Terrace, Port Richmond, N. Y.
28, 46.
19. F-ino Flonjo Dahme, 231 Harris Avenuo, Long Island City, N. Y.
A B—28, 40.
20. F-ino Clara Balog, 520 E. 79, Nov Jorko.
A B D—III.—24, 36, 45, 47.
21. A. A. Jenkins, 827 Elm strato, Manchester, N. H., Usonaj.
1a, 4.
22. W. Nutters, 94 van Ostadestraat, Amsterdam, Nederlando.
2, 5, 14, 20, 26, 36.
23. Ernesto E. Guerra, Orizaba, Meksikujo.
4, 9, 14, 20, 36.
24. Augusto Belle, 10 rue Millet, Grenoble, Francujo.
Deziroj sekvos.
25. Robert Belle, 10 rue Millet, Grenoble, Francujo.
Deziroj sekvos.
26. Ismael Gomes Braga, Teixeiras Minas, Brazilujo.



Deziroj sekvos.
27. F-ino Sophie Robinson, 1390 Boston Road, Bronx, N. Y.
B D—10, 26, 28, 46.
28. A. S. Arnold, 27 William strato, Nov Jorko.
I. II. IV.—4, 5, 9, 14, 17, 20, 23, 26, 33, 36.
29. Lino Fillisti, 244 E. 14, Nov Jorko.
D.—7, 18, 46, 50.
30. F-ino Emma Cohen, 63 E. 107, Nov Jorko.
A C D F—I. IV. V.—3g, 9, 12, 24, 27, 28, 32, 39, 41, 43, 45, 50.
31. F-ino Heloise Mary Brown, 59 E. 106, Nov Jorko.
A C D F—I. IV. V.—3g, 9, 12, 16, 27, 28, 32, 39, 41, 45, 50.
32. F-ino Mary Schwartz, 1265 Fifth Avenuo, Nov Jorko.
A C D F—I. IV.—3g, 9, 12, 24, 28, 29, 32, 41, 43, 50.
33. Homo Davidson, 69 E. 107, Nov Jorko.
A C—4, 9, 24, 27, 43.
34. F-ino Jessie Mendelson, 21-23 E. 104, Nov Jorko.
A C D F—I. IV.—3g, 9, 12, 24, 27, 28, 32, 41, 43, 45, 50.
35. F-ino Dorothy Cohen, 5-7 E. 107, Nov Jorko.
A C E—I.—16, 27, 28, 43, 50.
36. Joseph Ostrow, 124 E. 108, Nov Jorko.
A C D F—I. IV.—3 g, f, 9, 12, 27, 32, 41, 43, 49, 50.
37. F-ino Flonjo Rejsek, 217 E. 66, Nov Jorko.
B E—III.—14, 16, 20, 39, 40, 44.
38. F-ino Rose Butzell, 22 E. 129, Nov Jorko.
D—2, 6, 10, 11, 19, 22, 23, 25, 30, 36, 40, 50.

39. Micke Sental, 1681 First Avenuo, Nov Jorko.
B D—III.—4, 17, 36, 40, 45, 47.

40. Geo. A. Corson, box 12, Dumont, N. J., Usonaj.
40, 42.

41. L. A. Allavena, Bordighera, Italujo.
Deziroj sekvos.

42. P. J. Doyle, 110 Bloomfield strato, Hoboken, N. J., Usonaj.
3 c, 4, 9, 25, 36, 38, 45.

43. F-ino Lucille Baron, 2098 Vyse Avenuo, Bronx, N. Y.
A B D E F—1 a, b, 10, 17, 20, 26, 34, 39, 40, 46.

44. Armand B. Coigne, 293 Bedford Park Boulevard, Bronx, N. Y.
17.

45. Louis Chas. Nelson, 158 E. 55, Nov Jorko.
A B F—I.—1 a, 3 b, f, 26, 33, 39.

46. F-ino Majulino Rejsek, 217 E. 66, Nov Jorko
A B C F—I.—1 a, 16, 20, 26, 27, 34, 39, 40, 44

47. Secondo Nosengo, 452 W. 40, Nov Jorko.
A B D F—4, 52.

48. F-ino Ida Gershman, 121 E. 115, Nov Jorko.
B D—4, 9, 26, 46.

49. Ger. Paximadas, c. o. Qua., 130 W. 83, Nov Jorko.
A B D F—I. II.—1 a, b, c, 6, 8, 10, 13, 18, 25, 33, 36, 42.

50. Venceslas Voleŝ, 1489 Second Avenuo, Nov Jorko.
4, 5, 9, 20.

---



# DIREKTORARO

de la

## TUTMONDA INTERKORESPONDA KLUBO

## HARMONIO

1 OKCIDENTA 34a STRATO

NOV JORKO, USONAJ.

---

Financa sekretario: D. A. Klajin, 1 W. 34, Nov Jorko, Usonaj.

Sekretariino por amerikaj aferoj: F-ino Amanda Peterson, 442 Manhattan Ave., Nov Jorko, Usonaj.

Sekretariino por eŭropaj aferoj: F-ino Ludmila Reticky, 209 E. 71, Nov Jorko, Usonaj.

Sekretario por aferoj de Azio, Afriko kaj Aŭstralio: Benj. M. Crawford, 300 W. 111, Nov Jorko, Usonaj.

## KONSULARO:

**Bronx, N. Y.:** F-ino Sophie Robinson, 1390 Boston Road.

**Port Richmond, N. Y.:** F-ino Cora L. Buttler, 2074 Richmond Terrace.

**Long Island City, N. Y.:** F-ino Flonjo Dahme, 231 Harris Avenue.

**Hoboken, N. J.:** P. J. Doyle, 110 Bloomfield Strato.

**Dumont, N. J.:** Geo. A. Corson, box 12.

**Manchester, N. H.:** A. A. Jenkins 827 Elm strato.

**Orizaba, Meksikujo:** Ernesto E. Guerra, poŝtoficejo.

**Teixeiras-Minas, Brazilujo:** Ismael Gomes Braga.

**Amsterdamo, Nederlando:** W. Nutters, van Ostadestraat 94.

**Grenoble, Francujo:** August Belle, 10 Rue Millet.

**Bordighera, Italujo:** L. A. Allavena.



## REDAKTEJO.

Estimataj gelegantoj:

Ni esperas ke ĉiu Esperantisto ĝojos aŭdi ke la Esperantistaro de Nov Jorko fondis ĉi tiun Novjaron sub la devizo: kuraĝe antaŭen klubon "HARMONIO," kies celo estas kunigi Esperantistojn dezirantajn korespondadi pri iu ajn ilin interesanta temo kaj kolektadi aŭ interŝanĝadi iliajn amaĵojn.

Neatentante la eblajn malfacilaĵojn kaj malhelpojn, ni sekvis nian devizon kaj kuraĝiĝis eldoni nian bultenon en ĉi tiu formo enhavigante ĝin kun regularo, anaro, ŝlosilo kaj alvokojn necesajn.

Ne forgesu ke ĉi tiu bulteno estas eldonita nur "Esperantlingve" kaj ke nur Esperantistoj povas esti anoj de ĉi tiu klubo. Tial necesas ke ĉiu, komprenante nian lingvon aniĝu ĉar kreskado de "HARMONIO" ebligus nin pligrandigi la formaton de ĉi tiu gazeto kaj eldoni ĝin regule, monate aŭ semajne kun artikoloj aŭ tradukaĵoj el la mezo de ĝia anaro.

Ne forgesu karaj gelegantoj ke ni ĉi tie renkontas malfacilaĵojn pri la disvastigado de Esperanto ĉar ĉiu persono diras, ĉi tie ni nur bezonas la anglan lingvon, ĉar ĝi estas parolata en ĉiuj direktoj inter Nov Jorko kaj San Francisko, Meksikujo kaj la norda poluso! krom tio ĝi estas parolata en Hindujo, tuta Aŭstralio, preskaŭ duono de Afriko kaj Granda Britujo!

Krom tio la angla lingvo oferas ĉiuspe-

Neniam forgesu ke la plej venkiĝinta internacia helpa lingvo estas tiu kiu estas la plej facila kaj oferas la plej multajn praktikajn instituciojn!

Ni estas nun malmultaj sed niaj decidoj valoras plu ol nia nombro tial ni esperas ke la anaro de HARMONIO kreskados kaj ke vi estos certe unu, kiu aniĝos post tralego de tiu bulteno, kaj ke ni per via helpo trovos aliajn membrojn.

Nia bulteno estas nun eta afero sed ni esperas ke pro sia ideo ĝi plipagiĝos kaj foje atingos la dikecon de iu granda amerika monata revuo.

"HARMONIO," kore invitas ĉiun personon anigi kaj interesigi ĉiun alian Esperantiston en ĝin kaj kun tio vi tre efike helpos la plenumon de la bela interna ideo de l' Esperantismo.

La jara kotizaĵo estas nur UNU SPESMILO.

Ni esperas ke vi komprenis nin kaj kalkulas al via aniĝo.

Ni finas kun la belaj Zamenhofaj vortoj:

Forte ni staru, brave laboru,
Kuraĝe ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo!

HARMONIO.


ESPERANTISTOJ

SE VI HAVAS 10 SPESMILOJN

MALFERMU ĈEKKONTON

ĉe la

:-: ĈEKBANKO ESPERANTISTA :-:

Merton Abbey

:——: LONDON, S. W., ANGLUJO :——:

Petu la regularon

---

ESPERANTISTOJ ABONU TIUJN GAZETOJN:

AMERIKA ESPERANTISTO

Monata gazeto

Oficiala gazeto de Norda Amerika Esperanto Asocio

West Newton, Mass., Usonaj

---

THE ESPERANTO MONTHLY

Monata gazeto

Oficiala gazeto de United States Esperanto Association

Schaller, Iowa, Usonaj

---

THE BRITISH ESPERANTIST

Monata gazeto

133, High Holborn

LONDONO, Anglujo

---

**ESPERANTO** — Oficiala gazeto de U. E. A.— aperas duonmonate—10, Rue de la Bourse, Geneva, Svisujo

**ESPERO KATOLIKA** — (honorita de papo Pio, la 27an de Junio, 1906). Oficiala monata gazeto de Katolika Esperantista Ligo. — Dro J. N. J. Smulders.

**Schijndel, Nederlando**

---

**LIBERA PENSO** — Oficiala monata gazeto de Esperantista liberpensula ligo

**Rene Deshays, Sens, Francujo**
au
**James P. Morton, jr., 63 Vesey Street**
**Nov Jorko, Usonaj**

---

**INTERNACIA SOCIA REVUO**—Oficiala monata gazeto de laboristoj Esperantistoj

92, Ostadestraat
**Amsterdamo, Nederlando**

---

**LA REVUO**—Monata gazeto—Oficiala organo de Esperanta Centrejo Librejo Hachette & Co.,

79, Boulevard Saint Germain,
**PARIZO, FRANCUJO**

---

**AL NIAJ ĈEĤOSLAVAJ SAMIDEANOJ NI REKOMENDAS LA ABONON**
**de la monata gazeto**
**VOLNE LISTY**

kiu en ciu numero enhavas esperantajn legajojn kaj kostas nur 2 Spesmilojn pojare—Kunlaborantoj en ambaŭ lingvoj ĉiam dezirataj.—

Adreso: Volne Listy, box 5, Station Y, Nov Jorko, Usonaj.

BIBLIOTECA FASCI
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

Lifshitz Print, 217 E. Broadway, New York

ALLIED PRINTING TRADES UNION LABEL COUNCIL NEW YORK CITY 30